

Sed preskaŭ certe ĉiu konsultanto ankaŭ kun amara sento konstato, ke multo estas ankoraŭ fareda sur la kampo de la Esperanto-terminologio, kaj ke iu interna kunlaborado estas pli ol necesa...

Por ke tio realiĝu, necesos la ekzisto de iu nova Terminologia Centro. Kaj ne nur tio: tia centro certe ne kontribuu al iu amatora nomkreado, sed al serioza laboro. Kaj ĝi difinu siajn konceptojn ekde la komenco, ĝi havu la kunlaboron de kvalifikitaj personoj kaj ĝi certe ne tro inspiriĝu ĉe la multo da rubaĵoj kiuj jam estas produktitaj en la pasinteco.

Nur en tiuj cirkonstancoj oni estos sur la bona vojo por serioze kreitaj terminaroj. La venontaj jaroj povus montri, ĉu io tia realiĝos.

Referencoj

KAVKA Josef (2003). Scienca Vortaro de Esperanto (akompane al "La nova PIV 2002"). Scienca Revuo, Vol. 54 (n-ro 192), p. 1-56, *Eschwege*

NPIV (2002). La nova "Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto". Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), *Paris*

Adreso de la aŭtoro

OProf. Dr. Dr. W.M.A. DE SMET
Hertendreef 12
BE - 2920 Kalmthout
BELGIO

Priaŭtoro informo

La aŭtoro estas profesoro pri zoologio. Specialan engaĝiĝon li donas al NOVA BIOLOGIA NOMENKLATURO, kiu celas plibonigi kaj anstataŭi la ĝis nun validan nomenklaturan sistemon laŭ Lineo.

Recenzo

Marc BAVANT:

Matematika vortaro kaj oklingva leksikono

Česky-Deutsch-English-Esperanto-Français-Magyar-Polski-Russkij

Eldonis: KAVA-PECH, *Anglická 878*,
CZ - 252 29 Dobřichovice (Prago), 2003. 232 p.

Formato DIN A5. ISBN 80-85853-65-5

La aŭtoro *M. Bavant* partoprenis en la laboro pri kunmeto de multlingva Reta Vortaro (<http://purl.org/NET/voko/revo>), en kiu li redaktis la matematikan parton. Li trastudis la rilatan literaturon de cent jaroj kaj spertis la haoson en, kaj la malstabilecon de, la ekzistanta matematika terminaro. La rezulto estis ne nur la matematika materialo de la Reta Vortaro, sed ankaŭ lia memstara Matematika Vortaro aperinta okaze de la Gotenburga Universala Kongreso.

Mirakla libro! Post elpakado, unue mi hazarde ekvidis la desegnaĵon A3. Kurbecocirklo. Tiu cirklo kaj tanĝas kaj sekcas la kurbon en punkto M, kio estas la ĝenerala kazo por kurbecocirklo, kaj kion ofte eĉ bonaj matematikaj libroj ilustras erare kaj misgvide.

Nu, la unua impresio ofte estas decida kaj mi ne trompiĝis ankaŭ poste. La ekstera aspekto estas bela, la kovrilo malmola, la bindo fortika, la eluzo de la interna spaco - per mallarĝaj marĝenoj - estas ŝparema, la literoj estas belaj, samgrandaj kiel en La Nova PIV kaj bone legeblaj. La alterno de la dika, kursiva kaj antikva litero por la diversrolaj teksteroj bone helpas la komprenon.

La libro komenciĝas per po unupaĝaj instrukcioj en sep lingvoj pri la uzo de la vortaro. Poste ni trovas la E-lingvan enhavtabelon kaj sur 16 paĝoj la same E-lingvan kaj tre interesan Antaŭparolon pri la antaŭaĵoj, fontoj, principoj, enhavo kaj teknikaj aspektoj de la laboro kaj la verko, resp., sekvata de bibliografio el 17 titoloj de 1905 ĝis hodiaŭ. Ĉiuj ĉi estas legindaj, mi tuj ĝue finlegis la tuton.

